

Ankno 780304

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1997:6

TRI NEPRAĴOJ EN 1998

Jarkongreso de SEF

Stockholm, 15 – 17 de majo

TRI NEPRAĴOJ EN 1998

Universala Kongreso

Montpellier, 1 – 8 de aŭgusto

TRI NEPRAĴOJ EN 1998

Kultura Esperanto-Festivalo

Lesjöfors, 10 – 16 de aŭgusto

TRI NEPRAĴOJ EN 1998

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Januaro 1998 • 85-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion:

Jan Setréus

Franko Luin (teknisk redaktör)

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,

113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: espero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: HA Reklamtryck, Stockholm

Prenumeration 1998: 170 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

E-post: espero@esperanto.se

www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1998:

Direktansluten medlem 170 kr.

Familjemedlem (utan tidning) 75 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 75 kr. Medlemmar under 30 år samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*.

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Hemsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som EsperantoCentro Stockholm.

Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Bertil Nilsson

Manus till *La Espero*

sänds till Jan Setréus

Mörtgatan 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden

tel./fax 08-7177567

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

ĈEFARTIKOLO

Novaj promesoj

Novjaraj promesoj ofte respegulas mankojn kaj erarojn en la vivo. Se vi fariĝis pli peza dum la lasta jaro, vi volas fari ion por ŝanĝi tiun nedeziritan evoluon. Kelkaj promesas ĉesi fumadon, aliaj promesas fari gimnastikon aŭ longe promeni ĉiusemajne por atingi pli bonan sanstaton.

Esperantistoj devus promesi aĉeti kaj legi librojn en esperanto por ĝui de la multaj vere legindaj libroj, kiuj aperis dum la lasta tempo.

Por komencantoj venis antaŭ nelonge facil-lega libro, *La Orpantalono*, kiun tradukis kaj prilaboris Bertil Nilson. Nun venis nova facil-lega libreto, kiun Sten Johansson tradukis el la dana lingvo. La titolo estas *Inter tero kaj ĉielo*.

Por vi kiu iom flue legas, venis denove tradukaĵo el la manoj de Sten Johansson, *La vojo de serpento sur roko* (Ormens väg på hälleberget) de Torgny Lindgren.

La konata franco Ĵak le Puil laŭdis recenze nian svedan Sten Johansson, sed ĉi tie mi volas laŭdi la tradukaĵon de Le Puil, kiu kune kun Armela Le Quint, tradukis francan libron kun titolo *La maljunulino kiu paŝis en la maro*. La originalon verkis tre konata franca verkisto San-Antonio, pseŭdonimo por Frédéric

Dard, "jonglisto de vortoj".

Tiu libro estas vera defio por vi kiu sentas ke vi povas legi preskaŭ ĉion ajn en esperanto sen helpo de vortaro.

Se la verkisto de la originalo estas konsiderata "jonglisto de vortoj", mi asertas ke vi mem, post legado de la libro, povos konstati ke la tradukinta parto meritas tiun epiteton. La 343 paĝoj montras kaj pruvas ke esperanto estas vere esprimiva lingvo, kiam kapablaj lingvaj metiistoj utiligas la lingvaj rimedojn, kiujn esperanto disponigas.

UNESKO (UNESCO) estas grava kaj serioza organizaĵo en la mondo. Universala Esperanto-Asocio jam de jaroj estas membro de ĝi. Por homoj ekster la esperantomovado, tiu informo pri nia membreco diras ion pri la seriozeco de la lingvo esperanto kaj ĝiaj ideportantoj.

Se ni volas utiligi tiun membrecon por montri al eksteruloj, ke ankaŭ la esperantista organizaĵo estas grava kaj serioza, ni ne devas forgesi ke ni, kiel membroj de UNESKO, devas agi aktive por UNESKO. Tio komence signifas ke ni devas informiĝi pri tiu organizaĵo kaj pri ĝia laboro en la mondo. Ju pli ni povas montri ke ni apogas UNESKO, des pli ni ricevos subtenon de ĝia centra organo en Parizo.

Roland Lindblom

Ĉu UK en Gotenburgo?

Ekzistas planoj por eventuale organizi Universalan Kongreson en Gotenburgo dum unu el la unuaj jaroj de la dua jarmilo. La ideon estigis Göteborg & Co. - entrepreno posedata de la gotenburga komunumo kun la celo surmerkati la urbon turisme kaj kongrese - kiu sendis proponon al UEA en Roterdamo. La 11-an de novembro dek unu Esperantistoj reprezentantaj la svedan kaj gotenburgan E-movadon, estis ofertataj ĉirkaŭiradon en la ejo de Svenska Mässan kaj renkontiĝon kun reprezentantoj de Göteborg & Co.

Substreknendas ke nenio estas ankorau decidita, ĉar la afero devas esti zorge diskutata en la kluboj de la regiono, kaj kun SEF. La problemo estas: trovi sufiĉe da volontuloj por organizi la kongreson. Se ni esperantistoj en Gotenburgo trovos ke ni kapablas la personaran flankon ankaŭ restas decido flanke

de SEF prezenti Gotenburgon kiel kandidatan urbon al UEA. Kaj restos por vi kiun lokon UEA selektos por la preparolata jaro; 2003 estas proponata jaro.

Estas kompreneble malfacile antaŭdiri kiom da partoprenantoj havus mondkongreso; 2000-3000 povas esti verŝajna cifero, konsiderante antaŭajn kongresojn en Eŭropo. Oni ja ne bezonus mencii kian antaŭenpuŝon la Esperanto-Movado povus ekhavi en la regiono, kaj en la lando kiel tuteco, kun granda evento kiel ĉi tiu.

Sed unue niu diskutu la aferon.

Christer Lörnemark
(el Inter-Ligilo 5/97)

La estraro de SEF jam dum sia kunsido la 22-an de nov. esprimis sian apogon al la ideo. Red.

Wim

Mi naskiĝis en 1935 sur la insulo Java de la tiama nederlanda Hindio. Post la dua mondmilito mi loĝis kun miaj gepatroj kaj gefratoj en Nederlando ĝis 1962. Mia plej alta lernejedukado estas por radio-telegrafisto. En Svedio, kien mi translokiĝis kun mia nederlanda edzino en 1963, mi nur sekvis kursojn, ne lernejojn. Naskiĝis kvar gefiloj kaj nun estas ses genepoj. Unu el tiuj nomiĝas Berit, kiun eble kelkaj inter vi memoras.

Pro okulmalsano, mi povis ekŝiĝi kun pensio en 1996. Ankaŭ pro la fakto, ke mi estis senlaborulo dum du jaroj.

Pri Esperanto mi ekinteresiĝis en la jaro 1973. Post la refondo de la Esperantista klubo en Västerås, mi fariĝis sekretario. Nun mi estas "gvidanto" (ne diru prezidanton), redaktoro de nia klubo "Veka Bulteno" kaj redaktoro de Radio Esperanto, kiu en septembro celebris sian dek jaran jubileon, estas specialaĵo por Västerås.

Preskaŭ ĉiun tagon, mi havas taskojn por la radio, la klubo aŭ la movado ĝenerale. La svedan mi ankoraŭ ne tiel bone regas post pli ol 30 jaroj en Svedio. Pro tio mi preferas skribi Esperante.

Interesoj:

vojaĝoj en Esperantujo, laboro en parcela ĝardeneto, radio-programfarado, muzikaŭskultado (eble iom tro).

Ĉe landaj kunvenoj, vi ofte vidas min registri. Se vi bezonas sonmemoraĵon pri la Sveda Esperanto-Movado, demandu Radio Esperanto en Västerås, se iu sondokumento restas. Ni estas ŝparantaj ĉiujn programojn de la antaŭaj dek jaroj kaj intencas fari tion estonte ankaŭ.


Pli pri mi, la klubo aŭ la radio, vi povas trovi en la infompaĝoj de Interreto:

<http://www.quicknet.se/home/q-111060/wimesp.htm>


<http://www.quicknet.se/home/q-111060/veklubo.htm>

<http://www.quicknet.se/home/q-111060/radioe.htm>

Wim Posthoma ĉe sia labortablo en la hejmo en Västerås



Håkan



Ĉaŭ!

Mi nomiĝas **Håkan Lundberg**, havas 25 jarojn kaj eniris SEJU:n antaŭ ses monatoj kiel vicprezidanto. Laŭ mi la ĉefa laboro por SEJU nun estas aranĝi la Kulturano Esperanto-Festivalon (KEF) kiu okazos en Lesjöfors inter la 10:a kaj 16:a de aŭgusto (Se ankaŭ vi volas helpi pri tiu laboro, bonvolu kontakti iun en la SEJU-estraro).

Por mi Esperanto ne nur estas la laboro en SEJU sed ĉefe estas ilo por amuziĝi en eksterlandaj renkontiĝoj kaj konatiĝi kun interesaj homoj en diversaj landoj. Sed ankaŭ temas pri maniero subteni la ideon pri neŭtrala internacia lingvo, kiu iam en la estonteco fariĝos la mondlingvo laŭ la dana verkisto Martinus. Tio estis la kialo por mi ekstudii Esperanton antaŭ ses jaroj.

En la komenco mi studis tre maldense kaj nur dum mia unua Internacia Junulara Kongreso (IJK) pasintjare mi iom ekparolis. Ĉi-jare mi partoprenis kvar renkontiĝojn: la kurson en Lesjöfors, IJK-n en Assisi, la Esperanto-semajnon en Martinus-Centro kaj la TEJO-seminaron en La Chaux-de-Fonds.

En la estonteco verŝajne ne estos same multe da eblecoj por mi esti en Esperantio, ĉar mi ĵus eklaboris kiel programisto ĉe Ericsson.

Dum mia libertempo mi ŝatas aŭskulti rokmuzikon (kaj iom mem ludi) aŭ batali kun "mia" koramikino, kiu rifuzas esperantiĝi spite al multe da persvadprovoj.

Dankon por la vorto kaj ĝis KEF!

Esperanto-Gården esperigas

Esperanto-movado, ekde komenco de nia ekesto, ĉiam alfrontis amason de malfacilaĵoj. Travivis ankaŭ dramajn momentojn, kiam minacis al ĝi kompleta neniigo. Same nuntempe, en la epoko de konsumismo kaj inflacio de idealismo, ne estas facile aktivi. Tiukaŭze oni ofte aŭdas pri ŝrumpiĝo kaj stagnado de la Movado en diversaj lokoj.

Tamen esperigas pluraj iniciatoj de E-aktivuloj vaste en la mondo kaj persista strebado daŭrigi kaj antaŭen puŝi nian aferon. Tio aldonas fortojn.

Ekzempla ĉi-rilate montriĝis entrepreno de E-aktivuloj en Svedio. Delonge ili revis havi propran E-Hejmon kaj preskaŭ mirakle akiris sian celon. En junio 1996 20 svedaj Esperantistoj fondis kooperativon por aĉeti domon kaj ekde fino de la sama jaro ĝi ekposedis ĝin en Lesjöfors. La urbeto situas en pitoreska Vermlando, bele priskribite de Nobel-premiita verkistino Selma Lagerlöf, en regiono "Bergslagen". Tie en Esperanto-Gården (E-Hejmo) tuj post la ekposedo de la domo la estraro de la kooperativo ekagis kun granda elano.

Valoras citi la nomojn de la estraranoj; homoj neimageble sindonaj. Bengt Nordlöf, la prezidanto, kaj estraranoj Märtha Andréasson, Britta Rehm, Carl-Erik Ohlsson kaj Kajsa Hansen. Tamen la ĉefmotoro de la tuta entrepreno estas Esperantisto de Lesjöfors, homo eksterordinare dediĉa, Lennart Svensson. Li aranĝis aĉeton de la domo de la loka komunumo, laŭ tre favora prezo. Aranĝas renovigon. Li mem kapablas multon fari, aparte malmusltekoste aĉeti la tutan ekipaĵon por la Hejmo. Li funkcias kiel estro de la Hejmo, preta ĉiam helpi, solvi la problemojn.

Sed krom la menciitaj personoj pluraj aliaj svedaj Esperantistoj engaĝiĝis. Ili donis grandan financan helpon ĉefe per aĉeto de akcioj de la kooperativo je la sumo ĉ. 250 mil svedaj kronoj. Ankaŭ eksterlandaj Esperantistoj aĉetis iom da akcioj. Pluraj donacis monon kaj ankaŭ diversajn aĵojn kiel kurtenojn, meblojn, memoraĵojn. La konata sveda E-aganto, veterano de la Movado, Olle Ohlsson, donacis sian skribotablon, ĉe kiu li dum dekoj da jaroj verkis por Esperanto. Kelkaj donacis sian fakan laboron por kiel eble plej rapide renovigi la E-Hejmon.

Esperanto-Gården servas kiel gastejo - turisma domo ne nur por la Esperantistoj. Ja ne eblas ĝin gvidi sen nepra ekonomia bazo, kiun povas doni sufiĉe ĝia plenigado dum la tuta jaro. Por ke tio estu ebla oni planas plivarmiĝi la vandojn. Al ne Esperantistaj gastoj Esperanto estas prezentata en agrabla maniero. Temas pri informo kaj veko de interesiĝo.

En distanco de 80 km de Lesjöfors, en Karlskoga, troviĝas jam fama Popola Altlernejo, kie Lars Forsman de pluraj jaroj gvidas kelknivelajn E-kursojn.

Li multe kontribuas ankaŭ al funkciado de E-Hejmo, organizante tie E-kursojn al kiuj venas homoj de diversaj landoj.

Seminario

Inter la 20a kaj la 21a de septembro ĉi-jare okazis tie altnivela seminario aranĝita de Sveda Esperanto-Instituto. Invitite, mi kaj Jerzy Fornal, havis eblecon en ĝi partopreni. Ĝia temo estis: "La kultura lingvo". La estraro, kies bona spirito estas Märtha Andréasson, kapablis venigi al tiu aranĝo eminentajn prelegantojn el kelkaj landoj. Ĉefprelegantoj estis d-rino Marjorie Boulton kaj prof. Erich-Dieter Krause. M. Boulton prelegis pri "La proceso de sorĉistino kaj ĝia kato" kaj sekvan tagon pri la lingva temo amuze nomita: "Prepozicioj petolas korelativoj kapriolas". La prelegoj enhavis gravan historian kaj lingvan materialon, kaj sprita prezento donis al la prelegantino eblecon kapti atenton, kaj ravi la aŭskultantaron.

E.-D. Krause konata lingvisto ankaŭ prezentis du prelegojn: "Ĉu Esperanto devas pliriĉigi sian vortrezoron" kaj "La evoluo de la leksiko de Esperanto kaj ĝia evoluigo". Ambaŭ tre interesaj, aŭd-igitaj en modela Esperanto.

Krome tre interesan kaj kelkloke kortuŝan prelegon prezentis d-rino Aira Kankkunen, fakulino pri infana aŭdologio. Ĝia temo estis: "Malfermiĝo de lingvopordoj por surdaj infanoj". Ankaŭ la subskribinto havis eblecon prelegi pri "Janusz Korczak kaj Esperanto".

Al percepto de la prelegoj multe helpis averaĝe alta lingvonivelo de la partoprenantoj de la seminario. Entute ĉ. 90, ĉefe svedoj, sed ankaŭ personoj de kelkaj aliaj landoj. Tio evidentiĝis en mallongaj, sed interesaj debatoj post la prelegoj.

La organizantoj zorgis ankaŭ pri valora arta programo. Jerzy Fornal prezentis la spektaklon "La jubileo", bazita je scenaro de Zofia Banet-Fornalowa kaj Harold Brown. La spektaklo estis tre varme akceptita. Krome kantis kaj gitaris Andrea Forman, kiu ankaŭ prezentis lumbildojn pri "Bona Espero", kie ŝi dum kelka tempo laboris. Al la arta programo kontribuis ankaŭ aliaj partoprenantoj kiel ekzemple M. Boulton kaj Sten Johansson, kiu legis siajn verkaĵojn aŭ rakontis pri literaturaj temoj. Sekvis interesaj informoj primovadaj.

La vespero okazis en loka industria muzeo kaj finiĝis proksime de noktomezo.

La bona programo kontentigis. Formis bonegan etoson. Oni bone fartis en modeste, sed estetike aranĝita interno de la Hejmo. Aldoniĝas bongusta manĝaĵo.

Resume oni povas konstati, ke la aranĝo de ĉiu vidpunkto estis sukcesa. Entute agrabla, kaj ankaŭ instrua travivaĵo. Ĉion okazintan filme registris

Wim Posthuma el Västerås, kiun oni prave povas nomi E-dokumentisto.

KEF 1998

La estaro de kooperativo planas daŭrigi en la E-Hejmo de Lesjöfors valorajn diversspecajn renkontiĝojn. La plej grava por 1998 estos verŝajne la Kultura Esperanto-Festivalo, KEF-1998. Ĝi estas aranĝita ekde kelkaj jaroj de skandinavia junularo en Svedio kaj Danlando. La sekvontjara (1998) okazos inter la 10a kaj la 16a de aŭgusto.

KEF-oj, kie oni prezentas inkluzive originalan E-kulturon, estas ĉiam altnivelaj. Aldone okazigo de la aranĝo en bela ĉirkaŭaĵo en preskaŭ virga naturo, en urbeto "perdita" inter arbaroj kaj lagoj tutcerte plivalorigos ĝin. Tie oni povas spiri freŝan aeron, promeni laŭ arbaraj padoj, kanotadi. Aldone konatiĝi kun tre interesa pasinto de la regiono, iam industria, kie socia vivo de ministoj kaj fandejlaboristoj kaj laboradantoj estis organizita tre interese kaj nekutime.

La svedaj Esperantistoj povas fieri pri akiro de propra E-Hejmo. De apogo flanke de la Esperantistaro ankaŭ de aliaj landoj dependas grandparte ĝia sukceso. Per partopreno kaj kontribuoj valoras apogi la iniciaton.

Laŭdindaj svedoj

Valoras ĉi-loke almenaŭ mencii, ke svedaj Esperantistoj plurfoje, en malfacilaj por la movado, periodoj, entreprenis valorajn por ĝi taskojn. Kiam, en 1895, devis ĉesi ekzisti "La Esperantisto" (unua E-revuo), Klubo Esperantista en Uppsala lanĉis eldonadon de la nova s.t. "Lingvo Internacia". Tre grava por tiu tempo afero, ĉar la revuo estis tiam ĉefa centrigilo de Esperantistoj.

Kiam furiozis, en la mondo, ekonomia krizo (1929 - 1933), nekredoble, tamen... en Svedio okazis amasaj Ĉe-medtadaj kursoj, ĉefe por senlaboruloj. La unua invito kiun Lidja Zamenhof ricevis el eksterlando, instrui kiel Ĉe-instruisto, estis tiu de Svedio. Svedaj Esperantistoj pioniris ankaŭ en aranĝo de prelegurinoj. Kontribuis signife al riĉigo de E-literaturo traduka kaj originala. Ankaŭ tie aperigis valoraj por E-kulturo E-revuo, por nur mencii "Norda Prismo". En ĉiuj entreprenitaj laboroj la svedaj samideanoj amike kunlaboris kun Esperantistoj el aliaj landoj, kaj aparte kun la najbaraj.

E-Hejmo en Lesjöfors, la plej nova frukto de la sveda sindono kaj persistemo vekas admiron kaj esperigas.

Oni deziru al ĝi sukcesan estontecon.

Zofia Banet-Fornalowa

Eüropo-Azio'97



Esperantokongress i Sibirien är ingen vanlig semesterresa, det är en strapats.

Det enklaste är flygresan mellan Kastrup och Sankt Petersburg. Resan går på en och en halv timma med relativt hygglig komfort på Aeroflotplan.

Är man esperantist blir man väl mottagen om man aviserar sin ankomst. Inte mindre än fyra personer mötte upp, kända såväl som okända . .

Efter några dagar i Sankt Petersburg väntar tågresan till Sibirien och Jekaterinburg där esperantokongressen Eüropo-Azio'97 ska äga rum. Eftersom den internationella esperantorörelsens världskongress i år ägde rum i Adelaide i Australien är det många esperantister

runt om i världen som sökte sig till småkongresser på litet närmare håll.

Det tar ca 48 timmar med tåg från Sankt Petersburg till Jekaterinburg. Då gäller det att boka förstaklassbiljett och inte som mitt resesällskap andraklass. Skillnaderna är stora. Förstaklass är en sovkupé för två, andraklass för fyra och tredjeklass vagn utan mellanväggar och inget privatliv alls...

Det förekommer också en fjärdeklass, där passagerarna får sitta på hårda träbänkar hela resan.

Transsibiriska

Dock inte på resor med dessa avstånd. Detta var transsibiriska järnvägen från Sankt Petersburg till Vladivostok. Biljettpriserna är höga med ryska mått. Minimilönerna lär ligga på 300.000 rubel vilket gör att min returbiljett kostar två månadslöner i förstaklass.

Själva resan är ett äventyr i sig. Hjulens dunkande mot skenskarvarna är mycket rogivande på natten. Ibland stannar tåget 10-12 minuter och man kan gå ut och sträcka på benen eller köpa glass, tidningar, cigaretter, frukt eller grönsaker av typiskt ryska gummor. På tåget kommer med jämna mellanrum försäljare av olika slag och säljer tidningar och böcker och även andra saker som en tågresenär kan behöva. Efter resan på cirka 300 mil är det skönt att äntligen få stiga av och man längtar intensivt efter en dusch. Någon sådan i traditionell mening blir det dock inte. Bara kallt vatten tills vi uppsöker ett ryskt badhus med bastu som bara det är en upplevelse. Skumma, ruffiga lokaler och man kan knappt se en meter framför sig. På andra våningen där bastun är belägen sitter en

ryss med axellångt hår och piskar sig själv med björkris. Värmen är olidlig och endast en naken glödlampa i taket lyckas ge ett svagt sken. Väggar, bänkar, tak och golv är svarta och det blir inte många minuter i bastun. Tvätt-rummet känns genast svalare, men duscharna fungerar knappt, så man får själv blanda vatten och hålla över sig.

Esperantokongressen är ett arrangemang mellan Europa och Asien, därav namnet Eüropo-Azio'97.

Intressanta föredrag

Närmare sjuttio personer har anmält sig varav en från USA och en delegation från Kina. Vi blir ett femtiotal; en tysk och undertecknad, resten är ryssar och asiater.

Kongressens huvudtema är "Esperanto efter år 2000". Förutom detta finns många intressanta föredrag och utflykter bland annat till Tjajkovskijmuseet, besök på Urals geologiska museum samt picknick på själva gränsen mellan Europa och Asien och mycket mera. Det verkar som om Rysslands mest framstående esperantister har samlats här, författare, översättare, kompositörer, poeter och musiker, vilket gör att nivån är mycket hög på kongressen. Namn som Aleksander Korjenkov, Halina Gorecka, Viktor Sjapojnikov, Tatjana Kulakova, Andrej Parfentjev och många andra. Jag erhåller en bok av Fjodor Dostojevski, Brott och straff, översatt till esperanto där den heter Krimo kaj Puno direkt av översättaren med personlig dedikation. Det känns som om vi var en stor familj och att vi ska mötas flera gånger.

Storartad kongress

Det var en storartad kongress med ett fullspäckat program och jag är mycket säker på att livslånga kontakter knöts.

Generellt kan man säga att den allmänna bildningsnivån är mycket hög inom esperanton teoretiskt såväl som musikaliskt, vilket är en av anledningarna till att esperanto-språket på sin blott 110-åriga existens kunnat utvecklas och spridas till mer än hundra länder. En annan viktig faktor är att esperanton samtidigt som den utvecklats en egen kultur även utvecklar de redan existerande genom översättningar. På svenska finns bl.a. Astrid Lindgren, August Strindberg, Frans G Bengtsson och Selma Lagerlöf översatta till esperanto för att nämna några. Det finns 2-300 tidskrifter och musik och teaterstycken i en oändlig räckvid.



Kjell Randeled
(Ur Helsingborgs Dagblad 19/9 1997)

La samoanoj

KOREKTO

En La Espero 1997:5 p.9 la figuro malhavas la vertikalajn liniojn inter la viroj de malsamaj generacioj, pri kiuj oni povas legi en la teksto. Mi bedaŭras la preterlason.

Red.

NY MULTI-MEDIKURS

I Finland har Matti Lahtinen börjat att ta fram en multi-mediakurs i esperanto. Den ska kunna fungera på utställningar för att demonstrera språket, men även hemma för den som vill lära sig det.

I första hand kommer kursen att rikta sig till finsktalande, men den är tänkt att göras flerspråkig, beroende på antalet medhjälpare som Matti Lahtinen lyckas få ihop. Det ska vara lätt att växla från ett språk till ett annat och interaktiviteten blir bättre än den som dagens internet tillåter.

Kursen kommer att distribueras på CD-ROM.

Franko Luin

Konata antropologo

Unu el la malmultaj antropologoj konataj de la laika publiko estas la usonano Margaret Mead. Ŝi skribis plurajn laŭditajn libretojn pri kulturoj sur insuloj en la Pacifika Oceano. Temis pri infaneco kaj adoleskanteo, ofte kompare kun la usona socio. La menciitajn priskribojn oni povas legi en *Coming of Age in Samoa* (Devenanta de aĝo en Samoa). Kelkfoje la temoj seksaj tuŝis la usonajn tabuojn. Multajn jarojn poste oni kritikis ŝin, dirante ke ŝiaj informantoj mistifikis ŝin troigante siajn spertojn.

La infanoj

Jam je sia naskiĝo la infano estas akceptita de la socio, ne ekskluzive de siaj gepatroj. Povas ĉeesti dudek ĝis tridek personoj, ridantaj, ŝercantaj kaj ludantaj, dum la naskiĝo.

La infano estas mamnutrita ĝis la aĝo de du aŭ tri jaroj, sed jam ekde la unua semajno de sia vivo ĝi sučas su-

kerkanan sukon, kokoslakton kaj papajon. La beboj estas varitaj ĉefe de infanoj ses- aŭ sep-jaraj. Iom pli aĝa infano ankaŭ ĝuas sekurecon, fidante ke ĉiam oni helpas ĝin. Se la patrino estus for, la infanon vartas parencoj.

La usonaj infanoj malmulte spertas naskiĝon, seksan vivon kaj morton. La plenkreskuloj vualas la realon pri tiaj intimaĵoj. Kontraŭe la samoaj infanoj jam je juna aĝo kutimiĝas al ĉiuj el tiuj tri eventoj de homa vivo. Konstatante tion Mead traktas la multajn neŭrozojn en sia propra lando, kaj la malmultecon ĉe la samoanoj. La samoaj infanoj toleras siajn spertojn sen ĝenego. La verkistino atribuas la psikan stabilecon de la samoanoj i.a. al la pli gardema medio en kiu ili elkreskas, ludante gravan rolon la multo da gefratoj kaj aliaj parencoj.

Mead ankaŭ rimarkis ke oni ne punas tiun, kiu evoluas malrapide. Kontraŭe oni detenas la frumaturnan infanon, ĝis la aliaj ĝin atingis.

La tabuaro de la Samoa insularo ne estas tiel rigora kiel aliloke en Polinezio. Grava tabuo tamen estas la evito de infano de la sama parenco sed kontraŭa sekso. Tio validas por "gefratoj" (en plej vasta senco) kiuj ne diferencas je pli ol kvin jaroj pri aĝo, kaj kiuj ne estas tre junaj (aŭ tre maljunaj).

La adoleskantoj

La aŭtorino komparas la "okcidentulonon", kiu tro multajn jarojn okupiĝas pri aliaj aferoj ol la interseksaj, kaj fariĝas maljuna fraŭlino. Tion la samoano ne riskas. En malnova epoko la junulino, kiu estis neĉasta, riskis ke oni forrazus ŝian kapharon. Se oni rivelus tiun faktan ĉe la geedziĝo, ŝi eĉ riskus mortpunon. Nuntempe, tute ne.

Seksaj rilatoj estas rigardataj kiel natura kaj plezuriga afero. La libera sekseco validas por la plejmulto, esceptoj tamen estas la filinoj kaj edzinoj de estroj. "Sperteco pri seksaj aferoj, kaj la rekono de bezono de tekniko por trakti seksajn aferojn kiel arton, produktis ordon de personaj rilatoj en kiuj ne estas neŭrozaj elementoj, ne frigideco, ne impotento, escepte de kiel nedaŭra rezulto de grava malsano, kaj la kapablo de koito nur unu fojon nokte estas rigardata kiel senileco", skribas Mead.

La graveda juna edzino devas obei multajn tabuojn, kiuj ĉefe temas pri sol-eco. Sola ŝi rajtas nek promeni nek manĝi k.t.p. La akompano de nur la ed-

zo ne sufiĉas. La tabuoj estas klarigitaj per la aserto ke nur sola oni faras erarojn, kaj eraroj faritaj de la graveda edzino damaĝus la infanon.

Pri Esperanto

Mead vivis plurajn monatojn kun knabinoj de inter dek kaj dudek jarojn aĝaj, kaj per iliaj vivoj penis klarigi "kio devenas de aĝo" (kp. la titolon de la libro). Jam en sia juneco ili ja multon scias pri gravaj aferoj de la vivo. Sed ili malhavas profundajn sciojn pri la socio kaj kiel kondukti. Ili ne konas la Ĝentilan lingvon. Tiel ili ne ĝuste povas distingi la terminojn de parenceco. Ekzemplon pri tio oni povas doni per la vorto *tuagane*, kies signifo por knabino estas "virseksa parenco de la sama aĝgrupo", t.e. ekde ĉ. du jaroj pli juna ĝis ĉ. dek jaroj pli maljuna. Mead ankaŭ konstatas ke ili ne regas la dualon, nek majstras la liberan vortkonstruon per afiksoj. Ekzemplon pri la lasta ŝi donas per la vorto *fa'a*¹ (la apostrofo ĉi tie ne signas foreston de vokalo, sed t.n. glotan plozivon [kiel en la dana]), kiun la infanoj uzas en la vorto *fa'atama*, kies signifo estas "knabulino" (*tama* signifas "filo"), sed ne kiel prefikso en aliaj vortoj kiujn ili mem povus kunmeti.

La samoaj lingvo enhavas multajn komplimentajn frazojn, la t.n. *fa'alupega*. Kiam vizitantoj venas al fremda vilaĝo ili devas uzi tiajn specifajn vortojn pri ekz. estroj de la vilaĝo. Oni eĉ alparolas la estrojn per specifaj tiel substantivoj kiel verboj.

Mead klarigas kial samoaj knabinoj ne alfrontas la konfliktojn, kiuj abundas por juna usonano. La elektoj de la samoanino ne same povas minaci la sociajn normojn, kiel tiuj de la usonano. La lasta ja povus havi ekz. onklinon kiu "estas agnostikulo, fervora pledanto por virinaj rajtoj, internaciulo kiu apogas ĉiujn siajn esperojn sur Esperanto, sin dediĉas al Bernard Shaw kaj pasigas sian libertempon en kampanjoj anti-visekciaj."

Nur parenteze; Mi estus fiera pri tia onklino. Fakte Mead mem en artikolo pridiskutanta universalan duan lingvon proponis ke ĝi baziĝu sur gesta lingvo.

Jan Setréus

La klubo en Skövde nun 50-kapa

Skövde Esperantoklubb povis dum sia jarkunveno noti

- ke la klubo havas 50 membrojn,
- ke dum 1997 estis 21 propraj aranĝoj en Skövde,
- ke estis kontaktoj kun Tallinn en Estonio kaj den Helder en Nederlando kiel amikurboj,
- ke Karl-Gustaf Gustafsson aranĝis kluban hejmpaĝon en la interreto,
- ke li ankaŭ laboras pri Skövde-broŝuro en esperanto,
- ke la tuta estraro reelektiĝis: Torsten Hammargren, prezidanto, Kurt kaj Hilgon Frisk, Sten Broman, Carl-Erik Ohlsson, Rune Andersson, Bertil Johansson.

B.A.

¹ Verŝajne plej similas nian sufikson neoficialan *-esk*.

Ekstereŭropa leksiko de Esperanto

KEF '98

SEJU ricevis konsiderindan mon-kontribuon por la aranĝado de KEF '98 (la 10-an – 16-an de aŭgusto ĉijare) por kovri la kostojn de la invititaj artistoj. Pro tio la partoprenontoj ne bezonas pagi partoprenkotizon, sed nur la kostojn de restado (loĝado kaj manĝado).

Tio okazas por la unua fojo en la historio de KEF-oj! Informoj pri KEF '98 kaj interreta aliĝilo estas troveblaj je www.esperanto.se/kef.

Informiloj kaj aliĝiloj (ankaŭ por disdono al klubaj membroj kaj amikoj) estas riceveblaj ankaŭ de

Janko Luin
Mygdalsvägen 123
135 42 Tyresö
tel. 08-712 8291

Nia internacia lingvo estis kreita en Eŭropo, baziĝis sur gramatikaj strukturoj kaj vortrezoro de eŭropaj lingvoj. Dum la unuaj fazoj de sia evoluo la Esperantomovado ĉefe aktivis en Eŭropo. La kongresoj okazis en Eŭropo kaj la lingvon influis eŭropaj lingvoj. Ankoraŭ la duoninsulo de la eŭrazia kontinento regas la evoluon kaj eŭropaj lingvoj kontribuas per preskaŭ ĉiuj novaj vortoj al lingvo, kies pretendo estas tutmondco kaj kies vogleco kaj perspektivoj eble plej videblas en Azio, Afriko kaj Sudameriko.

Nia universala lingvo povus kaj riĉiĝi pri sia vortrezoro kaj fariĝi tutmonda per la alproprigo de fremdvortoj el lingvoj ne-eŭropaj. Jam troviĝas kelkaj, sed nur(?) tiuj kiuj jam enestas la vortrezoroj de aliaj eŭropaj lingvoj, do senperaj pruntoj el ekster Eŭropo ne okazis.

Jen kelkaj ekzemploj el PIV aŭ ties suplemento:

Vorto (Signifo)

alkovo (*litniĉo en ĉambro*)
amoko (*frenza kuro pro kolerego*)
atolo (*ringforma koralinsulo*)
cunamo (*longega marondo kaŭzita de sismo*)
guruo (*spirita majstro*)
kajako (*kovrita kanuo [el fokfeloj]*)
kivio (*senflugila nov-zelanda birdo*)
kralo (*bruto-korto fermita per palisaro*)
lamo (*malsovaĝigita ŝarĝbesto de la Andoj*)
lamao (*budhista pastro*)
ŝamano (*pastro-medicinisto de "naturpopoloj"*)
tabuo (*pro specifa moro evitenda fenomeno*)
totemo (*simbola reprezentaĵo de klano*)

La menciitaj vortoj devenas lingvojn ekstereŭropajn en kiuj la signifo estis pli malpli la sama. Tiu postulo ne estas nepra. La vortoj troviĝas en la vortrezoroj de eŭropaj lingvoj kiel ĉiutagaj vortoj aŭ fakvortoj.

La malsuprajn vortojn mi proponas kiel ekzemplojn pri vortoj enkondukigeblaj en Esperanton de ekstereŭropaj lingvoj. Ili estas troveblaj en faktekstoj de kelkaj eŭropaj lingvoj.

Vorto (Signifo)

atapo (*tegmento de palmaĵoj*)
cancao (*trofeo de kuntirita kapo*)
kakia (*havanta polve brunflavan koloron*)
kulao (*rita komerco kun sociala signifo*)
mingao (*laboro por najbaro rekompencata per festeno*)
puo (*provizejo sur palisoj protektata kontraŭ bestoj*)
ŝerio (*religia leĝo [de islamo]*)
soroĉo (*malsano pro alteco*)
vadio (*fluejo de sekiĝinta rivero*)

Ankoraŭ unu paŝon signifas la senpera prunto el ekstereŭropa lingvo. Jen proponoj el la svahila, lingvo kiun mi konas, kiujn oni ne vidas en tekstoj de eŭropaj lingvoj:

Vorto (Signifo)

bao (*ludo kun ŝtonetoj [aŭ simile] en kavetoj*)
bas (*nu sufiĉe*)
gondo (*sunsekigita fiŝo*)
hodi (*interjekcio; ĉu mi rajtas eĥiri?*)
kango (*tutkorpa virina vestaĵo el du ŝtofpecoj*)
masiko (*longa pluva sezono*)
sindikizi (*eskorti gaston je eliro*)
ugalo (*densa maiza kaĉo*)
emvulo (*mallonga pluva sezono*)

Kion vi opinias?

Origina lingvo

la araba
la malaja
la maldiva
la japana
sanskrito
la eskima
la maoria
la kojkoja° (?)
la keĉua
la tibeta
la mongola (?)
la tonga
la algonkina°

Origina lingvo

la java
la ĥivara°
la hindia
la trobrianda°
la keĉua
la ajnua
la araba
la keĉua
la araba

En la svahila

bao
bas, basi
ng'onda
hodi
kango
masika
kusindikiza
ugali
mvuli



Kultura Esperanto-Festivalo 1998

En Lesjöfors,
la 10-an – 16-an de aŭgusto

Preskaŭ tuta semajno da
originala esperanto-kulturo

SEJU

Foto:
Virino en kango
kiu melkas
kaprinon.



Jan Setréus

Forpasis amiko

ESPERANTO PĀ BIO

Den 17 oktober släppte Columbia Pictures ut filmen "Gattaca" i vilken dialogerna delvis är på esperanto. Om du vill veta mera om filmen, titta på deras hemsida på internet. Den informationen är på engelska.

Det hör inte till vardagen att man använder sig av esperanto i filmer. Ett av de mest kända exemplen är Charlie Chaplins "Diktatorn", i vilken skyltarna över affärerna är på esperanto. Ett annat senare exempel är "Red Dwarf", en engelsk parodi på science fiction-filmer som man kunnat följa även i svensk tv. I den hör det till vardagen i rymdskeppet att gå till esperantoklassen och att skyltar är på esperanto.

Franko Luin



La 25-an de marto 1996 Pola Radio Esperanto-elsendo transdonis malĝojan informon: en Gotenburgo forpasis Lennart Åberg. Malgraŭ ke estis sciante, ke Lennart estas grave kormalsana jam de pluraj jaroj, la sciigo frapis kaj tre ĉagrenis ĉiujn kiuj konis tiun eksterordinaran homon.

Mi kredas ke la svedaj s-anoj skribos memorartikolon en kiu ili prezentos vaste meritojn de la forpasinto por E-movado. Ĉi loke mi volas nur memori ĝi tiun aferon de lia agado danke al kiu mi havis feliĉon kun li renkontiĝi kaj multe lerni; temas pri preleĝturneoj.

Jam en la 30-aj jaroj Lennart ekhavis ideon inviti al Svedio spertajn E-prelegantojn el diversaj landoj, eĉ mondpartoj, kiuj povus prezenti interesan temon al ĉefe neesperantista publiko en Esperanto tradukita paralele en la svedan. Per tio li volis vastan aŭskultantaron kaj komunikilojn interesi pri Esperanto, montri ke ĝi estas vivoplena lingvo per kiu oni povas esprimi ĉion,

"La pa(s)tro estas tre(s) bona"

I apostlagärningarna står det berättat om hur apostlarna på pingstdagen blev uppfyllda av helig Ande och begynte tala andra tungomål, eftersom Anden ingav dem att tala. Denna lösning av världsspråkfrågan är dock ej realistisk.

Ludoviko Zamenhof föddes i en liten stad i Polen där man talade fyra språk. Som barn såg han hur människor på gatorna kom i gräl med varandra därför att de inte förstod varandra. Han funderade över detta och om det inte var möjligt att skapa ett lätt internationellt språk vid sidan av folkens modersmål. Han fullföljde sina funderingar och skapade ett språk med enkel grammatik, esperanto.

Enligt en ungersk språkvetare är det för en europé cirka sju gånger lättare att lära sig esperanto än att lära sig engelska. Jag hemställer härmed att kyrkans representanter av alla kategorier tar sig an uppgiften att sprida information och verka för esperanto.

Yngve Sörman, Årsta
(Ur Kyrkans Tidning
42/1997)

kaj samtempe prezenti socie interesan temon.

Lennart Åberg ĝisosta socia aganto kaj eksterordinara organizanto, homo kiu per sia persona ĉarmo kapablis allogi homojn, kutimis siajn ideojn konsekvence realigi. Tial li jam en la 30-aj jaroj ĝis la eksplodo de la dua mondmilito venigis al Svedio kelkajn eminentajn prelegantojn, eĉ eksterĉiujajn. Ĉi tre sukcesan agadon li daŭrigis post la dua mondmilito ĝis komenco de la 80-aj jaroj, tiom longe kiom permesis al li lia ĉiam pli malforta koro.

Mi havis feliĉon ek troviĝi inter la elektitaj de Lennart prelegantoj, kaj lia elekto estis ĉiam profunde pripensita. Post la propono prelegi pri Janusz Korczak, pri kiu mi jam pli frue kelkloke prelegis, li petis sendi la tekston de preleĝo. Samtempe li petis polan ambasadoron en Stokholmo sendi la materialojn pri la temo. Post pristudo de ĉio ricevita, en tio la libroj de Korczak tradukitaj en la sveda, kaj certiĝo ke la persono de Janusz Korczak kaj lia pedagogia sistemo meritas, de ĉiu vidpunkto, esti vaste prezentita al la studentoj kaj ĉefe pedagogiaj medioj, li decidis konatiĝi persone kun la prelegantino. Li venis de Gotenburgo al Stokholmo tiu-cele. Ni renkontiĝis en kafejo de la sveda parlamento, en ĉeesto de mia filino, kaj tio estis la plej agrabla "ekzameno" kiun oni povas al si imagi... Rezulte mi ricevis inviton por monata turneo al okcidenta Svedio, kiu daŭris de la 17/3 - 18/4 1980, dum kiu tempo mi kune kun Lennart aŭdigis 31 preleĝojn. Ĝi estis antaŭita de la tri-semajna turneo en regiono de Örebro kaj suda provinco de Svedio, Skanio, organizita tre bone de alia sveda E-agantino Kerstin Rohdin, kiu en la arto interpreti strebis sekvi, admiratan de ĉiuj ĉi-riate Lennart. Ĉi monatan kunlaboron kaj pli ĝenerale kunestadon kun Lennart, kiu estis ne nur organizanto de turneo kaj interpretisto de la preleĝoj, sed ankaŭ servis kiel ŝoforo de la turneo, mi konsideras plej impresan travivaĵon en mia tuta esperantista vivo. Lia prizorgo, varmkoreco, ekzempla organizeco kaj neimageble perfekta interpretado kaŭzis, ke tiu laboro feliĉigis min. Mi ne nur havis eblecon al centoj da svedoj prezenti pedagogian kaj protektan agadon de granda humanisto Janusz Korczak, sed povis kunlabori kun homo, kiu profunde sentis la temon, kio donis bonajn rezultojn de nia laboro. Lia kuraĝiga apogo pliigis la sukcesojn. Li kapablis interesi pri la turneo Societon de Unuiĝintaj Nacioj kaj plurajn influajn personojn, ankaŭ la amaskomunikilojn.

La ĉefa trajto de karmemora Lennart estis, ke li amis homojn, fidis al ili, kaj la homoj reciprokis al li helpante realigi liajn planojn. Tion mi povas sperti plurfoje, kaj ke tio favoris al Esperanto estis evidente.

Mi estis feliĉa kiam mi eksciis, ke la Internacia Societo je Memoro de Janusz Korczak atribuis, en 1982, al Lennart Memor-Medalon je la nomo de Janusz Korczak (Mi ricevis ĝin kelkajn jarojn pli poste). Li estis pro tiu distingo tre korusita kaj en interparolo kun mi esprimis opinion, ke ĝi apartenas al la plej gravaj en lia vivo. En la dankletero sendita al la Internacia Korczak-Societo en Varsovio li skribis i.a.: "...Mi estas verdire tre emociita pro Via grandanima honorigo al mia persono. Tiun laboron, kiun mi faris kiel ĉefaranĝanto kaj interpretisto okaze de preleĝa turneo, estis malgranda kontribuo miaflanke al la alta vividealo, por kiu agadis kaj batalis Janusz Korczak ĝis sia lasta spiro." En daŭra parto sekvas varmaj vortoj pri la prelegantino, kiu laŭ li devas esti unuavice honorigita. Tia estis Lennart Åberg, ĉion kion li faris fontis en lia bonkoreco, kaj lia sindono ŝajnis al li tute natura, sed ne avaris pri laŭdoj, instigaj vortoj kaj agoj koncerne aliajn agantojn.

Mi kredas, ke la preleĝturneo pri Janusz Korczak, protektinto de forlasitaj infanoj kun kiuj li restis ĝis ilia lasta vojo al murdkoncentrejo Treblinka, estis vere treege grava por Lennart. Li ĉiam estis flanke de infanoj. Diversmaniere laboris por ili. Dum pluraj jaroj li aranĝis internaciajn konkursojn de infana pentroarto kaj enspezo por vendado de la infana arto servis al infanoj bezonantaj helpon. Li devas resti ankaŭ en ilia danka memoro.

Pri Lennart Åberg, tre klera esperantisto, ŝatanto kaj apoganto de E-kultruo, altklasa oratoro kaj interpretisto, publicisto kaj organizanto de sukcesaj SAT-kongresoj, aliaj aranĝoj kaj kursoj valoras pli vaste skribi. Oni devas studi kiamaniere li kapablis aranĝi tiom da preleĝturneoj.

Ĉi aferon de sia agado li konsideris tre grava por merito de Esperanto, preparo de grundo por ĝia efektivigo. Li kredis, ke tiuj kiuj aŭdis iam vivan Esperanton per interesa temo, en flua interpreto estos pro ĝi favoraj, kaj tio ja tre gravas.

Lennart Åberg forpasis, sed lia riĉa poresperanta sperto ne devas perdiĝi. Li restos por ĉiam en koroj de tiuj kiuj lin konis, ĉar li estis homo homeca, neforgesebla.

Zofia Banet-Fornalowa

Jubileo en Västerås

Ni povas konstati, ke la festo tute ne estis fiasko. Nur bedaŭrinde, ke ne (preskaŭ) ĉiuj membroj venis por celebri tiun okazintaĵon.

Ni povis diversmaniere logi nemovadanojn al la festo por informi ilin pri Esperanto. Tial estis bone, ke la klubo povis lui parton de la kulturdomo "Växhuset" en kiu multaj junularorganizaĵoj havas sian ejon.

Ankaŭ muziko povas ilin allogi. Krome la redakcioj de la aliaj radiogrupoj de Radio A faris anoncojn pri la festo. Cetere, "Radio Västmanland" (P4) intervjuis min du tagojn antaŭe pri Esperanto kaj la okazintaĵo. Sed VLT neis publikigi iun sciigon kaj eĉ la senpagan anonceton por lokaj asocioj. Ni ankaŭ havis flugfoliojn, sed nenio helpis. La sekvo estis ke neniu interesota venis.

Sed ŝajnas al mi, ke ili kiuj partoprenis, opinias ke estis agrabila festo. Tio ĉefe, dank' al la ĉeesto de *Nataša Berce* kaj *Oksana Kurpekova* kaj ilia belega kantado kaj rakontarto. Krome venis *Bengt Nordlöf* el Stokholmo, *Kajsa Hansen* kaj *Anita Bergh* el Upplands Väsby, kiuj kunportis ekspozicion. Vizitis min ankaŭ *Henry Thomaner* el Norrköping ne atendite.

Alia muzikgrupo, kiu ludis por ni estis la trio "*Delicados*" kun *Giorgio Marchente*, gitaro, *Kaj Stridell*, saksofono kaj kanto (ankaŭ esperante) kaj *Albert Eklund*, kontrabasoj.

La kafejoj de "Växhuset" ni mem prizorgis. Tio signifas, ke la gajno (ĉ. 300 kr) estis por la klubo. Antaŭe, kvin klubanoj preparis kelkajn pelvokukojn, grandan poton da supo, indoneziajn kroketojn (fritbulojn) kaj ĉinan nudelan manĝaĵon "bami". Compreneble ankaŭ diversajn trinkaĵojn.

Juna esperantisto, *Sjoerd Bosga* el Nederlando, kiu ĵus translokiĝis al Västerås, helpis kaj montris la diversajn Esperanto-paĝojn en Interreto. Li ankaŭ sendis mesaĝon al Esperantonj pri la okazintaĵo.

Unu el la plej sukcesaj aranĝoj estis la rekta disaŭdigo de nia radioprogramo de 60 minutoj. Ni sendis de "Växhuset" kaj de la studio de FMV. Tio okazis la unuan fojon en la historio de Radio Esperanto kaj estas bona memorajo. Bedaŭrinde ni ne ricevis reagojn de niaj aŭskultantoj. Tiun bonan rezulton ni dankas al la teknikistoj Kaj kaj Stig, kaj al la prezentisto Klas.

Wim Posthuma
(el La VEKa Bulteno 4/97)

La somera kurso
en Lesjöfors 8-20/6
1997

Estis tre sukcesa kurso. Pli ol 40 partoprenantoj, el tiuj multaj gejunuloj, i.a. tri el niaj nunaj membroj, sekvis la lecionojn, Jonna kaj Liza en la komencanta grupo por Georgo Handzlik. Krome ankaŭ ĉeestis Margareta, Majken kaj Märtha de nia klubo. Estis ankaŭ tria grupo por konversacio kaj gramatikaj problemoj, kiun gvidis Nata Berce.

Estis multe da kantado kaj muzikado, kaj la familio Handzlik kaj la familio Berce altigis la etoson en la vesperoj. Sed estis multaj el la partoprenantoj, kiuj kantis kaj nin amuzigis, ofte spite akompanata de Andreo Berce.

Krome estis ekskurso al Märbacka kaj vizito en la Muzeo de Lesjöfors. Kaj la tutan tempon la suno brilis, kio pli altigis la bonan etoson.

Lars Forsman respondecis pri la aranĝo, kunlabore kun la Popola Altlernejo de Karlskoga.

Nova Libro
igen!

Bokklubben Nova Libro har fôtts, legat i dvala och återväckts tidigare. Nu är det dags igen! Behovet av en bokklubb känns av och vi hoppas att det är tillräckligt många som känner så, för att vi ska kunna få bra priser.

Varje utskick kan komma att ligga i prislägen mellan 150 och 250 kr inkl. porto.

Första boken blir **Vualo de l'silento**.

En ung framgångsrik kvinna berättar om sin svåra uppväxt. Hon föddes i Algeriet och familjen flyttade till Frankrike. Brytningen mellan två helt skilda kulturer skildras på ett nära och övertygande sätt. Författarinnan skapade sin egen framtid till trots av i högsta grad handgripligt motstånd från större delen av familjen. Inte ens när hennes framgångar gav familjen möjlighet att lämna det gettoartade slumkvarteret, fick hon stöd, utan man motarbetade grunden för sin försörjning. Mer avslöjas inte här.

Anmäl ditt intresse för bokklubben till

Anita Dagnarsdotter
Magasinsgatan 3A
775 51 KRYLBO
(tel. 0226 - 109 39)

Ĉu via bebo aŭdas?

Aperis nova libreto de Aira Kankkunen, *Ĉu via bebo aŭdas? - Frua serĉado de aŭdodifektoj ĉe infanoj. Kompendio por infanprizorgocentroj*.

"Por gelegantoj. La fonto de ĉi tiu esperanta kompendio estas la sveda manlibro por infanprizorgocentroj. Ĝi efektiviĝis post multjara intensiva kunlaboro inter Aŭdologia sekcio de Sahlgren malsanulejo kaj Infanŝirma centro de Göteborg. Ĝi estis publikigita en la jaro 1986 kun la nomo: Hör ditt barn? de Aŭdologia sekcio de Sahlgren malsanulejo kaj Infanŝirma centro en Göteborg."

Aira Kankkunen.

Oni povas mendi la libreton ĉe UEA Libroservo kaj ĉe la verkistino per 35 Skr + sendokostoj.

Aira Kankkunen,
tel./fakso 031 - 18 79 82
aira.kankkunen@swipnet.se

(El Inter-ligilo 5/97)

KOMENCANTO
gizeto por korespondaj kursoj kaj komencantaj esperantistoj N°11
ESPERANTO en LITERATURO

Ĉu estas literaturo?	Ano, ĉiu bazo pri	La UNESKO PENSODON, ĝis la unua
Ĉiuj ni ĉiuj, ke aperas literaturo, estas	la UNESKO, karesanta la kiel ĝi	mondo, karesanta la kiel ĝi
Ĉiuj ni ĉiuj, ke aperas literaturo, estas	la UNESKO, karesanta la kiel ĝi	mondo, karesanta la kiel ĝi
Ĉiuj ni ĉiuj, ke aperas literaturo, estas	la UNESKO, karesanta la kiel ĝi	mondo, karesanta la kiel ĝi
Ĉiuj ni ĉiuj, ke aperas literaturo, estas	la UNESKO, karesanta la kiel ĝi	mondo, karesanta la kiel ĝi
Ĉiuj ni ĉiuj, ke aperas literaturo, estas	la UNESKO, karesanta la kiel ĝi	mondo, karesanta la kiel ĝi
Ĉiuj ni ĉiuj, ke aperas literaturo, estas	la UNESKO, karesanta la kiel ĝi	mondo, karesanta la kiel ĝi
Ĉiuj ni ĉiuj, ke aperas literaturo, estas	la UNESKO, karesanta la kiel ĝi	mondo, karesanta la kiel ĝi

Ny tidning för nya
esperantister

Från Jekaterinburg i Ryssland kommer en ny tidning, *Komencanto*.

Den utkommer med 8 nummer per år och kostar 100 kr. Den går att beställa, liksom alla andra esperantotidningar, på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto.

Tidningens redaktör förklarar att *Komencanto* är en tidning för nybörjar-esperantister av vilken som helst ålder. Under 1998 kommer man att berätta om esperantotidskrifter.

Framförallt uppmuntrar man esperantister att själva bidra med översättningar, gåtor, aforismer, anekdoter, teckningar, originalberättelser och dikter till tidningen. Detta är det bästa sättet att uppöva sin esperanto, menar man.

Man planerar att publicera grammatiska utläggningar, men underhållande sådana.

Komencanto är också en mötesplats, bl.a. finns det i varje nummer på sista sidan 20 adresser från hela världen.

Jan Setréus

Respondo al NN

Kiu estas NN? Oni ne scias. Oni nur scias KIA li estas. Almenaŭ oni povas diveni laŭ lia skribaĵo en numero 4/1997 ke li estas tre juna kaj tute nova esperantisto, tute sen sperto de nia movado kaj sen sperto de instruo de esperanto. Ankaŭ li estas malbravulo kiu ne kuraĝas respondi pri siaj opinioj kaj skribas sub NN.

Estas skandalo de la redaktoro enmeti la skribaĵon.

Verŝajne NN neniam aŭdis pri la plej grava regulo de esperanto: La principo de Neceso kaj Sufiĉo. Do mi devas instrui lin.

Principo de neceso: en konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finigojn, necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto.

Principo de sufiĉo: se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata en la kunteksto sen iu el la sufiksoj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenece-sa.

Jam en la jaro 1912 la esperantistoj lernis tion.

NN indigniĝas pri la frazo: La redaktanto esperantiĝis 1975. Kompreneble li esperantistiĝis. Mi donis la frazon al la lernantoj en mia grupo, kaj ili bone komprenis la signifikon de esperantiĝis. Sed ili lernis pri la Principo.

Mem mi esperantiĝis antaŭ preskaŭ 70 jaroj. Do mi estas spertulo pri la movado kaj pri la lernado. Mi laboris en nia esperantocentro dum la jaroj, kiam *La Espero* estis eldonita tre neregule, ĉar ekzistis neniu redaktanto. Tiam homoj en la tuta lando telefonis kaj skribis al la centro kaj ĉagrenis, ĉar ne venis *La Espero*.

Ili demandis kiel NN: Kio okazis al *La Espero*? Sed ili demandis ankaŭ: Ĉu la movado mortis? Kie estas ĉiuj 08-uloj? Ĉu ankaŭ ili mortis?

Kaj mi spertis kiom grava la revuo estas por la membroj kiuj ne apartenas al iu klubo. La revuo devas veni dum la jaro, en la monatoj promesitaj. Kompreneble gravas ankaŭ la enhavo kaj la kvalito de tiu. **KOMPREENBLE**. Sed la plej grava tasko de la redaktanto estas doni al la membroj pruvon, ke ili apartenas al la movado.

Nun ni havas redaktanton. Finfine. Ni estu kontentaj kaj feliĉaj. Ni helpu lin kaj ni kuraĝigu lin.

Kaj ni tuj batu kontraŭ ĉiu sabotanton.

Ingemar Nordin

Reago kaŭze de letero de NN

Mi volas reagi al la plej nova *La Espero* (Ne plu! red.).

Unue laŭdon al via redakta laboro kaj bonan daŭrigon! En via unua numero vi promesis ne timi la ferocajn legantojn, do daŭrigon tiel kaj ignoru tiun stultan leteron.

Due, diversaj lingvaj malglataĵoj kaj strang(et)ajĵoj ja tamen enestas. Ekze en la artikolo pri la vaskoj mi pli ol dekofoje stumblis pri iuj lingvaj dubindaĵoj.

Tamen trie, la ĉefa celo de mia alskribo estas kritike komenti pri via bildstrio. Resume *La Espero* ne estas la taŭga loko por ĝi. Laŭ la formo kiu similas al taggazeta bildstrio, la leganto atendas iun humuraĵon aŭ satiraĵon, sed tio ĝi tute ne estas.

Estas iuj (preskaŭ banalaj) rakontoj aŭ anekdotoj pri nekonata familio vojaĝanta al Rusio. Kiuj ili estas? Ĉu veraj aŭ fikciaj? Kiujn karakterojn ili havas? Kiel ili nomiĝas? Kion celas la bildstrio? La leganto restas neinformita kaj disrevita. Krome la aĉa preskvalito estas despli malalloga.

Do, via bildstrio havas sian valoron, sed ne en *La Espero*! Kiel bildstria aktivo (vd. *Literatura Foiro* 164) mi tamen ĝojus se vi povus enpreni iun bonan bildstrion! Ĉu eblos? Sincere salutas,

Martin Weichert

Esperanto används på Länsbibliotekets nya "sajt"

Länsbiblioteket i Stockholms län har i januari 1998 lagt på internet informationen om vilka utländska tidningar och tidskrifter som finns på biblioteken inom länet. Denna information ges på svenska, esperanto och engelska.

TT-Magasinet, som "sajten" heter


(kort för "Tidnings- och tidskriftsmagasinet", adress www.algonet.se/~tt-mag) har tagits fram i samarbete med SEF, och fungerar tillsammans med dess **Kiosken** genom att referera till dess mer än 3500 länkar till tidningar från 160 länder.

Kiosken används flitigt av biblioteksbesökare, framför allt invandrare, som söker nyheter från sina respektive länder.

Värt att notera är också att man hittar länkar till **Esperanto-Kiosken** (som man också kallar den) på riksdagens hemsidor, inom regeringskansliet och olika statliga myndigheter, många av de största svenska exportföretagen och olika mediaföretag, bl.a. Sveriges Radio och Svenska Dagbladet.

Nyligen har t.o.m. USAs mest prestigefyllda bibliotek, Library of Congress, lagt en länk till Kiosken. Vanliga användare hittar den också bland *Pasagens* länkar och t.o.m. hos *Ellos*.

Franco Luin



Kiu estas NN?

La reagoj kiujn esprimis esperantistoj svedaj al la letero al la redaktanto en numero 4 ĉi-jara de *La Espero* estis tre diversspecaj. Mallonga poŝtkarto de Henning von Rosen (skribita je lia transloĝigo al Norvegio) povus reprezenti la reagon de esperantistoj kiuj plej bone konas min:

"Vi estas NN, ĉu ne? Estis amuze! Fartu bone, bonan redaktadon!"

Mi ankaŭ ricevis telefonvokon kun indigna reago al la filetero, kaj komprenis ke oni ne nur konsideris la fakten enhavon de la letero, kiu estis la celo de ĝi, sed ankaŭ kritikis la skribinton pro la maldigna ago riproĉigi idealisme laborantan redaktanton. Mi sincere petas pri pardono, se mia trompeto ĝenis iujn esperantistojn!

Tiujn kiuj estis "trompitaj" mi jam informis (i.a. antaŭ ol publikigi leteron). Mia intenco ja estis havigi al mi reagojn pri la enhavo de *La Espero* (kaj iniciati debaton ankaŭ pli ĝeneralan), ĉar ĝis nun mi vane atendis resonon. Sekve tiuj kiuj reagis plenumis miajn esperojn.

Do mi esperas ke vi, karaj legantoj de *La Espero*, pli inspiriĝis ol fortimiĝis al skribado estonta.

Jan Sétréus

Sportlov i Lesjöfors

Vecka 7, 8 eller 9. Välkommen till Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors.

Gör som andra gymnasieungdomar - åk skidor och lär dig Esperanto om du vill!

Bo på vårt vandrarhem - billig kost, logi och slalomåkning.

2 km till slalombacke - när den inte är öppen finns det tre alpina anlägg-

ningar i Hagfors, Fredriksberg och Filipstad alla på mindre än 40 km avstånd. Elljusspår 100 m från kursgården.

Möjligheter till orientering om eller kurser i Esperanto under sportlovsveckan.

Kontakta: Esperanto-Gården
tel. 0590 - 309 09
fax 0590 - 303 09

Välkomna!

Lingva seminario

La suda distrikto de SEF aranĝos la 14-an kaj 15-an de marto 1998 Lingvan Seminarion por progresantoj en la ejo de Malmö Esperantoförening, Krone-torpsgatan 94.

Gvidos la seminarion Natalia Berce. Vespere la 14-an ni havos distran vesperon.

Posttagmeze la 15-an la distrikto okazigos sian jarkunvenon. Pli detalaj informoj estas haveblaj ĉe Lisbet kaj Bertil Andreasson, 0415-501 52.

Lisbet Andreasson

Trandans och esperanto

Veckoslutskurs i esperanto kombinerat med utflykt.

Skövde Esperantoklubb anordnar den 18 - 19 april utflykt till Hornborgasjön och trandansen jämte kurs i esperanto.

NYBÖRJARKURS - SNABBKURS I ESPERANTO.
FORTSÄTTNINGSKURS - ENKLARE SAMTAL/
DIALOGER, GRAMMATISKA FRÅGOR.
KONVERSATIONSKURS - UTTRYCK DIG I ALL-
DAGLIGA SITUATIONER.

Program:

Lördag 18 april

- 09.00 - Samling och kaffe i klubb-lokalen, Tung. 4C (10 min promenad från stationen).
- 10.00 - Bussutflykt till trandansen vid Hornborgasjön. Billingen runt.
- 16.30 - Kursverksamhet
- 19.00 - Middag/kaffe
Kvällsprogram som bygger på deltagarnas medverkan.

Söndag 19 april

- 09.00 - Kursverksamhet (med avbrott)
- 16.00 för mat/kaffe)

Logi: Gratis. Privat eller i kurslokal (sovsäck medtages)

Kostnad: Totalt för hela programmet 250 kr.

Anmälan: Senast 22/3 1998 till 0500-485546 (Carl-Erik) eller 0500-416451 (Gunnar). Vi vill veta dina önskemål om: logi, vegetarisk mat, kursnivå.

Alla är välkomna

Skövde Esperanto-klubb

Gymnasister på vänskapsvecka

Den internationella vänskapsveckan, enligt statuterna den sista hela veckan i februari, firas i år vid Esperanto-Gården i Lesjöfors. Veckan sammanfaller med sportlovet i delar av landet varför en hel del ungdomar väntas delta. En gymnasieklass från Helsingborg är anmäld och en likaledes esperantostuderande klass i Huskvarna har inbjudits.

Utom esperantoprät och kurser blir det rikliga tillfällen till vintersport, skidåkning både utför och på längden. Firandets höjdpunkt blir lördagen den 21, då Esperanto-Gården för besök av en kinesisk esperantist.

För att icke-esperantister ska kunna delta blir det tolkning till svenska. Alla är välkomna att manifestera vänskapen över gränserna och mellan esperantister och icke-esperantister.

Dum cent jaroj en Stokholmo

En aprilo 1898 fondiĝis esperanto-societo en Stokholmo. Tion la klubo planas festi la (kalendare) saman tagon, t.e. la sabate la 4-an de aprilo. Al tiu festo kompreneble ankaŭ gastoj de la aliaj kluboj estas bonvenaj. La detala programo estas ankoraŭ preparata, sed jam nun vi rezervu la posttagmezon kaj vesperon por restado en la ĉefurbo.

Honore al la centjariĝo de esperanto en Stokholmo ankaŭ la jarkongreso de SEF ĉijare okazos ĉi-tie, kaj certe la jubileo estos iel rememorata dum la kongresaj tagoj.


Internationell vänskapsvecka

Vecka 8 (16-22 februari) firas den traditionella internationella vänskapsveckan vid Esperanto-Gården i Lesjöfors. Esperantister såväl som icke-esperantister välkomnas — ungdomar, familjer och enskilda. Vintersport och esperantoprät. Lördagen 21 februari: besök av kinesisk esperantist. Information och rumsbokning per tel 0590-30909, fax 0590-30309.


Välkommen!

Sten Svenonius
Vendelsfridsgr 4C
21764 Malmö

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm



KRUCVORTA ENIGMO



SOLVO DE 97/5

	A	B	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	A	B	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
2	K	A	T	A	S	T	R	O	F
3	L	E	R	T	A	P	I	K	
4	E	B	L	O	J	N	L	A	C
5	D	U	O	N	D	I	R	I	L
6	U	T	A	T	A	K	T	S	
7	K	O	N	S	E	R	V	I	T
8	I	N	O	N	D	A	S	A	G
9	S	T	A	C	I	E	S	T	R
10	T	A	N	I	S	E	O	N	

Horizontale


- 1 Manĝas ni ofte kun fromaĝo
- 2 Rilate al bela lando - Organa
- 3 Plenrajtajn urbanojn
- 4 Instrumenton - Faros truon en tero
- 5 Ĝenaj' sur piedo - Maĉil'
- 6 Muzikteatraĵ' - Longega temp'
- 7 En rato - Pli ol ŝatanta
- 8 Ne vi - Riĉa je arbedo' ulekso
- 9 Italian dancon
- 10 Birdospertulo

Vertikale

- A Li uzas duradan veturilon
- B Profitodona - Kapvest' por papo
- C Neĝo povas konsisti el blanka tio - Vaz'
- Ĉ Virina nom' - Sensanga
- D Fiŝkaptil' - Malkonfirm'
- E Papero pri komerĉaĵo
- F Riveron en Italio - Sidil' por rajdanto
- G Rilate al foresto de ostoj - Teksaĵo
- Ĝ Onklino karese - Ripozejo en dezerto
- H Norvega polusesploristo kaj pacamiko - Membro

REBUSO

(Solvo de la rebuso en numero 5: Kvarco en roko ĉe valo)



Lennart Persson (Solvo en sekvonta numero)